



**2(138)
2013**

Apudvistula Bulteno

de Krakova Societo **ESPERANTO**

Bultenon redaktas: ĉiuj anoj de Krakova Societo **ESPERANTO**,
Adreso por korespondi: str. Sokolska 13, 31-515 KRAKÓW

Sergiusz Riabinin

Ke ni ne detruu tutan naturon

Sankta Francisko,
bremsu la frenezon,
ne permesu,
ke ni detruu tutan naturon,
ke ni forvendu ĝin je plasto,
je buntaj vitretoj,
je fero ...

Konservu por jarcentoj
grenon sur la agro,
gresojn sur la limrando,
alaŭdon sur la ĉielo,
ĉevojajn salikojn,
bonodorajn herbejojn,
fojnostakojn,
kaltojn, ranunkolojn,
rivermeandrojn,
ombrajn arbarojn,
padojn inter arboj,
silenton sur lageto,
malvojn antaŭ la domo ...

Kaj super ĉio
laterojn de la Kruco,
ŝirmantajn la terglobon kontraŭ la infero,
apertantajn al ĝi la ĉielon ...



Ne permesu, ke la homo neniĝu

Sankta Francisko,
ne permesu, ke la homo neniĝu,
ke li kresku je senspecaj nutraĵoj,
satiĝu per mizereco –
dum la Arbo de l' Kruco ĉiam plenviva,
dum Kristo atendas ...

Sankta Francisko,
neniam estu la homo
aŭtomatglobo ...
Prefere li ĉiam burĝonu
el la Arb' de l' Kruco ...

Sankta Francisko,
superverŝita per Lucido Dia
kvazaŭ la kampoj per juli-varmego,
elkonduku la tristajn kelloĝantojn,
al la SUNO,
alie ili blindiĝos.

Sankta Francisko,
deŝiru la homon el la Babelturo,
ne jam li konstruu la pluajn etaĝojn,
ne algluu la flank-konstruaĵojn,
ne kompliku la labirintojn ...
Ĵetu lin sur la greson de l' arbarherbejo,
direktu al la kampo
en horton florantan,
silenton de l' preĝejo ...

Sankta Francisko,
deŝiru la homon el la Babelturo,
redonu lin al la Triunuo Sankta ...

Habemus Papam

Venis la nova erao en vivo de la katolika Eklezio. Preskaŭ neniu supozis, ke la laŭvica papo povas ekesti kardinalo de la malproksima Buenos Aires en Argentino. Romo kaj la tuta mondo travivis momentojn de surprizo kaj skeptikemo. La 23-an de marto 2013, je la 19:06 h. super Siksta Kapelo aperis la blanka fumo informanta pri la farita kardinala elekto. Poste, je la 20:22 h. arigita multnombre fidelularo povis jam sur balkono de Baziliko al Sankta Petro ekvidi la novan Sanktan Patron kaj ekkoni lian nomon.

Jorge Mario Bergoglio estas ido de Regina Maria Sivori kaj Mario Jose Bergoglio, italaj elmigrintoj de Piemonto, kies nupto okazis en Argentino, en 1935 j. Post la jaro ekvidis la mondon ilia la plej aĝa filo Jorge Mario, kiu ankoraŭ havis du fratinojn (Marta Regina kaj Maria Elena) kaj du fratojn (Alberto Horacio kaj Oscar Adrian). La patro de la familio laboris en la fervoja entrepreno.

La juna Jorge Mario ne tuj decidis esti pastro. Li gajnis la fakan titolon teknikisto-kemiisto kaj interesiĝis, kiel multaj samaĝuloj, pri piedpilko kaj tango. Havante 22 jarojn li komencis studi teologion ĉe la jezuita ordeno. La studado daŭris longe; li estis konsekrita en 1967 j. Kiel posta provinestro de la jezuita ordeno (en sepdekaj kaj okdekaj jaroj) li multfoje defendis sian bonan nomon, ĉar estis akuzata pri kunlaboro kun reganta tiam en Argentino ĥunto. En eldonita en 2010 j. membiografio li skribis, ke faris ĉion eblan por liberigi la kaptitajn sacerdotojn. En 2012 j. kardinalo Bergoglio, kune kun la tuta argentina episkoparo, tamen esprimis la bedaŭron pro faritaj per Eklezio pekojn de rezigno dum regado de ĥunto. Nuna prezidento de Argentino Cristina Fernandez de Kirchner ne favoris lin. Kiam la parlamento konsentis je edzecoj de unuseksaj personoj, Bergoglio nomis tion „atako kontraŭ la dia ordo”. Sinjorino Prezidento agnoskis lian opinion „inda de mezepoka inkvizitoro”.

Malgraŭ ke jezuitoj votas ne akcepti ekleziajn honorojn (escepte la generalo de la ordeno povas de tio liberigi) pastro Bergoglio en 1992 j. fariĝis episkopo. Ses jarojn poste papo Johano Paŭlo la Dua nomumis lin arkiepiskopo, kaj en 2001 j. – kardinalo. Papo Benedikto la Deksesa faris lin ano de la Papa Komisiono pri Aferoj de Latina Ameriko.

La novelektita Papo mirigas de la komenco. Pro iniciato de la humila, komuna preĝo por li tuj post la unua apero antaŭ la homamaso, pro modesteco en konduto kaj vesto. Li ne akceptis ruĝan pelerinon, oran ringon kaj multekostan krucon. Lia papa ringo la unuan fojon en historio ne estas ora, sed leĝere orumita. La surbrustan feran krucon li konservis; li portis ĝin kiel episkopo de Buenos Aires. Interesa estas lia kontribuo en historion de la papaj botoj. Ĉiuj papoj kutime portis la botojn ruĝajn. Johano Paŭlo la Dua ne konsentis je tio kaj preferis botojn brunajn, ne tiom okulfrapajn. Benedikto la Deksesa revenis al ruĝaj botoj pro estimo al la tre malnova kutimo. La nova Papo protestis, kiam oni proponis al li la ŝanĝon de la botoj, li restis en siaj, ĝis nun portataj – nigraj kaj verŝajne li tiamanire kreis la novan kutimon.

Sed la plej grava, favora miro aperis kiam oni informis, ke la Sankta Patro elektis nomon de Francisko el Asizo, unu el la plej grandaj sanktuloj de la kristanismo. Francisko el Asizo, filo de la riĉa komercisto kaj reprezentanto de la ora junularo rezignis de havaĵo kaj honoroj kaj dediĉis sin al dia servo. Kiam en unu el vizioj la krucumita Kristo de preĝejeto al S-ta Damiano en Asizo diris al li, ke li devas savi lian preĝejon, ĉar ĝi falas, la junulo interpretis tion laŭvorte kaj komencis renovigi la templeton. Poste li ekkomprenis, ke temas pri la tuta Eklezio. Kolerigita pro gravaj renovigaj elspezoj patro de Francisko juĝe lin senheredigis. Nun Francisko vagis tie kaj alie, kolektis almozojn, riparis preĝejojn. Finfine li decidis edziĝi al fianĉino Povreco kaj faris

tion solene. Samtempe li gajnis dekdu kamaradojn kaj kune kun ili predikis la dian vorton en valo Rieti. Francisko volante fondi la novan ordenon petis la papon Inocenton la Trian aprobi la novan manieron vivi, por si kaj la kunuloj. Sankta Patro ne konsentis permesi, ĉar timis skandaleman konduton de tiamaĵ migrantaj predikantoj. Tamen post la sonĝo, en kiu iu simila al Francisko apogis ŝanceliĝantajn murojn de Laterano – aprobis petojn de la juna asizano. Ordeno de franciskanoj povis esti fondita. Ĝia regulo proklamas ĉefe devon esti povra kaj servi al povruloj. La unuaj franciskanoj revenis al Umbrio kaj setliĝis ĉe preĝejo al la Dipatrino Anĝela, en loko nomata Portiunkula. Ĉirkaŭ jaro 1211 Francisko enmanigis la kuton al Klara de Offrouccio donante la komencon al ordeno de Povraj Sinjorinoj, poste nomataj klaraninoj. Li estis mistikulo, stigmatulo, homo modesta kaj humila. Pri ricevitaĵoj de li stigmatoj de la Pasiono preskaŭ neniu sciis; tio fariĝis konata ĵus post lia morto. Liajn predikojn volonte aŭskultadis la ordenaj fratoj, simplaj kaj kleraj homoj kaj, laŭ legendoj, ankaŭ birdoj, lupoj el Gubio kaj aliaj bestoj. Liajn ordonojn obeis floroj kaj la tuta naturo. Vintre, en la jaro 1223, en Greccio, Francisko aranĝis la vivantan bildon montrantan la betlehemian staletan, en kiu partoprenis ankaŭ bestoj. Ĝi estis la unua, kristnaska kripo en Eklezio. Francisko estas aŭtoro de „Kanto al la frato Suno” – pruvo de lia sinteno rilate al ĉiuj vivantaj estaĵoj kaj al la naturo. Li mortis vespere, la 3-an de oktobro, en 1226 j. La 4-an de oktobro oni rememorigas lin en liturgio de la katolika Eklezio. Kanonizis lin en 1228 j. lia amiko, kardinalo Ugolino, kiu eksidis sur la papa trono kiel Gregoro la Naŭa. Papo Johano Paŭlo la Dua proklamis Franciskon patrono de ekologio.

Neniu el 263 ĝisnunaj papoj elektis nomon Francisko. Kun tiu elekto ligiĝas eblaj, gravaj ŝanĝoj en kompleksa agado de la Eklezio. Vortoj de la papo Francisko, ke la Eklezio devas esti povra kaj por povruloj, povas igi la veran revolucion. Ne nur vorte, sed ankaŭ age la Papo montras, ke tio eblas. Li rezignis el luksaj vestoj, la persona limuzino, grandioza hotelo. Ne alie li kondukis en Argentino, vojaĝis per aŭtobuso aŭ biciklo, loĝis en modesta bloko, ofte mem kuiris kaj ordigis.

Li helpis al ĉiuj kaj ĉiam ridetis, estis aperta kaj senpera. Dum unu el busaj vojaĝoj, ankoraŭ en Argentino, kardinalo Bergoglio renkontis junan pastron el provinco, kun kiu li favore interparolis demandante pri malfacilaĵoj de lia komenca, pastra vojo. Kiam laŭvice la junulo demandis pri lia posteno – li respondis simple: „Mi estas ĉi tie arkiepiskopo”.

Jam kiel la papo Francisko piedirante tra iu el romaj stratetoj, li rimarkis knabineton sidantan sur invalida ĉareto. Etulino havis rompitan piedeton en la gipsa pansaĵo, ornamita per desegnaĵoj kaj surskriboj de gekolegoj. La Papo ekstaris, eligis el poŝo globkrajonon kaj faris la subskribon sur gipso. Oni ne notis impreson de la malgrandulino, sed akompananta al ŝi patrino stuporiĝis kaj preskaŭ svenis. La Papo kun asistantaro kviete iris plu.

La homoj inklinas al li kun ĝojo kaj espero, raportante: „Tio, kion li diras estas tiel simpla kaj saĝa. Emanas de li amo al Dio kaj al homoj”. Moto de lia homilio dum la pontifika meso estis frazo: „Ni ne timu bonon kaj impreson”. Tio devis plaĉi al la homamaso sur Placo al Sankta Petro. Plaĉas ankaŭ lia humorsento. Kiam li ne volis veturi per limuzino kun sekurigistoj, diris: „Mi vojaĝos kun knaboj (kardinaloj) per aŭtobuso”. Kaj dum la unua vespermanĝo kun „knaboj” li ekserĉis: „Kompatu vin Dio tion, kion vi al mi faris”.

Buenos Aires amis sian arkiepiskopon. Eble amos lin la tuta kristana mondo. Buenos Aires signifas „bonaj, amikaj ventoj”. Ni esperu, ke ĝuste tiaj ventoj blovos nun en Romo kaj en la tuta Eklezio.

Lidia Ligęza

Mia aventuro kun Esperanto

Multaj homoj, eksciinte pri mia lernado de Esperanto demandas min: kial? pro kio? por kio? Fakte, ankaŭ mi ne scias tion, tamen mi supozas, ke cio komencis pro mia amo al lingvoj kaj al ... televidprogramoj. Sed mi parolu de la komenco.

En la jaro 2008, ĉe pola televido reaperis post kelkjara paŭzo pola versio de mondkonata, brita programo *Who Wants To Be A Millionaire?*, en la pola *Milionerzy*. Malgraŭ ke tiam mi estis nur 10-jara, mi jam sciis, ke ĝi rigardindis, do mi spektis ĉiun epizodon. Samtempe mi komencis interesiĝi pri planlingvoj.

En jaro 2009 mi komencis krei mian unuan planlingvon, kiun mi nomis **larmocka lingvo** (larmocke *M'Aiamat'us M'ish*). Mi disvolvadis ĝin malrapide, sed konstante, dum preskaŭ du jaroj, sed hodiaŭ ĝi nur ridetigas min. Mi ankaŭ multe legis pri aliaj planlingvoj, ĉefe pri interlingvao. Mi eksciis, ke oni povas ellerni ĝin dum 15 tagoj. Hodiaŭ mi scias, ke tio eblas ĉe neniu lingvo, sed tiam mi kredis je tio. Mi volis lerni ĝin, sed mi ne povis trovi iun lernolibron aŭ ion alian.

Decembre de la jaro 2010, en *Milionerzy* aperis demando: „Kio estis Ludoviko Zamenhof, kreinto de artefarita lingvo Esperanto?”. Tiun vesperon mi decidis lerni iom pri la gramatiko de Esperanto kaj mi jam sciis pri la finaĵoj: -i, -is, -as, -os, -o ktp., tamen plu mankis al mi vortoj, pri kiuj mi tute ne volis „perdi” la tempon. Ĉio ŝanĝiĝis januare, en 2011 j. La 29-an, unu tagon antaŭ mia semajna vintroferia ekskurso al Zakopane mi pensis, ke anstataŭ enui mi povus lerni vortojn – kaj tiel okazis. Ĝis nun je demando: „Kiam vi eklernis Esperanton?” mi respondas: „La 29-an de januaro 2011”.

Tiel komencis mia aventuro kun Esperanto, kiu plu daŭras kaj senĉese surprizigas min per novaj okazaĵoj, interesaĵoj kaj personoj, pri kiuj mi verŝajne neniam ekscius sen la lingvo internacia. Ankoraŭ en la jaro 2011 mi ekiris al gimnazio. Tie mi ekkonis Ewa Kordylewska, pranepinon de konata astronomiisto, Kazimierz Kordylewski. Ŝi estis la sola persono, kiu sciis, kio estas Esperanto. Malgraŭ tio, mi ne volis kredi, ke ŝia avo, Leszek Kordylewski estas esperantisto. Ĝis kiam ŝi donis al mi Skype-an kontakton al li...

Tiam komenciĝis multaj tekstaj interparoloj kun sinjoro Leszek; la temoj estis diversaj. Mi ne timis skribi, ĉar mi pensis, ke neniam lin renkontos. Tio estis eraro. Jam oktobre de 2012 j., al Krakovo el Ĉikago alflugis avo de Ewa kaj ni renkontiĝis. Poste li informis min, ke kiam Ewa diris al li pri iu esperantisto-samklasano, li pensis, ke jen iu spritulo lernis kelkajn vortojn. Kaj jen estis mi, kiu vere volis paroli esperantlingve.

Komence de ĉi-jaro mi kun Ewa faris tri filmetojn pri Krakovo, en Esperanto, kiuj certe ne estas perfektaj, tamen mi iom fieras pro ili.

En januaro de la jaro 2013 mi unufoje venis al Kulturdomo „Podgórze”, kie kutime renkontiĝas anoj de Krakova Societo ESPERANTO. Kaj tiel tio daŭras ĝis hodiaŭ, tamen se iu demandus min antaŭ 2 jaroj, ĉu mi povus post du jaroj skribi artikoleon en Esperanto por esperantlingva revuo - mi sendube neus.

Tobiasz Kubisiowski

Krakova Societo ESPERANTO

La programo de la renkontoj aprile 2013 j.

- 4. 04. – Lidia Ligeża. **Slavaj paskaj kutimoj**
- 11. 04. – Tobiasz Kubisiowski. **Mia aventuro kun Esperanto**
- 18. 04. – Grażyna Porada. **La esperantaj lingvaj ludoj**
- 25. 04. – Marta Michałowska. **Kiu mortigis Jesuon. Recenzo de la libro de Pawel Lisicki**